

Enspezanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 515, 1981.09.17 & 19

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Iom da humuro en nia serioza ĉiutaga vivo estas bonvena. Tial kiam ni trafolumas gazeton, tuj la ridvortojn kaj ŝercojn ni pli malpli unuamove sercas. Bedaŭrinde niaj esperanto-revuoj plej ofte tro severas, por senti la neceson de bonhumora rubriko. Tiurilate ni konas kelkajn esceptojn. Ĉijare ni jam citis humuraĵojn el LA KANCERKLINIKO. Kaj oni scias, ke la revuo KULTURAJ KAJEROJ de la Kastelo Greziljono havas bonhumoran paĝon, kaj EL POPOLA ĈINIO konigas al ni la ŝercemon de la ĉinoj.

A.- A1 la ŝatantoj de bonhumoro kaj eĉ satiro ni hodiaŭ anoncas, ke la septembra-oktobra numero de Germana Esperanto-Junularo, tio estas la revueto GEJ-GAZETO, havas du titol-paĝojn. Se vi malfermas ĝin flanke de la kutima titol-paĝo, ĝi tute normale aspektas. Nur en la enhavtabelo vi eble rimarkos, ke la paĝoj 34-a, 35-a kaj 36-a estas dediĉitaj al la revuo "Enspezanto". Tralegante ĝin, vi kun miro konstatas, ke tiuj ĉi tri paĝoj estas inverse presitaj. Por ilin legi, vi devas turni la GEJ-GAZETOn, kaj tiam vi rimarkas, ke la lasta paĝo de la GEJ-GAZETO estas fakte la titol-paĝo de la revuo ENSPEZANTO, kaj ke ĝi havas fakte aspekton, kiu tuj pensigas al la revuo ESPERANTO de UEA.

C1.- Eble la funkciuloj kaj gvidantoj de UEA furiozos, kiam ili malkovros, ke la germana esperanto-junularo satiras kontraŭ ili. Niaflanke ni bone ridis, legante la vortludojn de la tri paĝoj de la revuo ENSPEZANTO, kies dato estas septembro 1984. Kaj ni tuj malavare decidis partoprenigi vin al tiu satira bonhumoro.

A.- ENSPEZANTO estas fakte eldonita de UNIVERSA ESPERANTO-AMBICIO KUN STULTAJ RILATOJ AL UNESKO. Tiu subtitolo tuj komprenigas, ke la satiro de la GEJ-anoj celas certan aspekton de la UEA-sinteno, kaj por bone kompreni la titolon ENSPEZANTO ni devas reveni al la paĝo 13-a de la normala GEJ-GAZETO. Temas pri reprodukto de letero, kiun Germana Esperanto-Junularo sendis la 14-an de aŭgusto al TEJO, la junulara fako de UEA. Estas vera milit-deklaro kontraŭ la kotiz-politiko de TEJO kaj UEA, kiuj fariĝis antaŭ ĉio **enspezantoj**. Ni citu erojn el tiu ĉi letero, kiu estas en si mem historie grava:

C1.- "Post plurjara sveniga altiĝo de la IJK-kotizoj oni evidente ĉi-jare perdis la lastajn skrupulojn. La kotizoj por IJK Leuven transiras ĉiajn raciajn limojn: jam la meza kotizo havas la nekredeblan altecon de 290 guldenoj. Pliaĝuloj ne eluzantaj la plej fruan aliĝperiodon facile pagas preskaŭ 400 guldenojn, prezo, por kiu eblas jam ricevi kompletan unusemajnan restadon en diversaj feriaj lokoj en- kaj eksterlande, inkluzive vojaĝon. La kongreso do montriĝas pura kapitalismaĵo por monhavantoj kaj funkciuloj kaj per tio perdas ĉian valoron por nia laboro. Ni decidis ĉi-jare finfine serioze reagi.

A.- Ili daŭrigas dirante ke:

Cl.- "GEJ plurfoje avertis TEJOn pri la konsekvencoj de tia kotizpolitiko, bedaŭrinde sen iaj rezultoj. Evidente belaj vortoj neniel efikas.

A.- Kaj ili konkludas:

Cl.- "Sciu do, ke Germana Esperanto-Junularo ĉi-jare rifuzas ĉian kunlaboron pri la kongreso.

A.- Konkrete tio signifas, ke GEJ rifuzos dissendi invitilojn/aliĝilojn pri la kongreso al siaj membroj, ke kontraste al la antaŭaj jaroj ĝi ne subvencios membrojn, kiuj partoprenos la kongreson, sed uzos la subvenciojn por pli indaj aranĝoj, kaj fine minacas, ke se la IJK-kotizpolitiko ne konsiderinde ŝanĝiĝos en postaj jaroj, ili ne hezitos apliki pli drastajn metodojn.

Cl.- La tri paĝoj de la revuo **ENSPEZANTO universa esperanto-ambicio kun stultaj rilatoj al Unesko** estas do satira frapo kontraŭ la pli kaj pli monavida sinteno de UEA kaj de ties junulara sekcio TEJO. Kaj la titolpaĝo de tiu revuo ENSPEZANTO reproduktas foton, sur kiu estas presita la anonco, ke NUN FUNKCIAS PROPRA OFICEJO DE LA ASOCIO EN LA MONDA METROPOLO. Kaj oni vidas super la Novjorka UNO-palaco sub literegoj UEA la du vortojn Centra Oficejo. GEJ do reagis negative al la elspezoj, kiujn la reprezentaj rilatoj ĉe UNO en Nov-Jorko kaŭzas al UEA, devigante ĝin trovi fontojn de enspezoj.

A.- Sed nun ni ekzameni la enhavtabelon de tiu ENSPEZANTO. Ni citas :

Cl.- Tonkin en Svedio: 15 jarojn post la Deklamacio de Tirkestö.

A.- Fina Akto de la Akademio - princa paro de Frustravallen.

C1.- Juraj aspektoj de "Neŭtila Esperanto-Movado"

A.- Kongresa komuniko pri la 69-a kongreso en Bervalio

C1.- Recenzoj... "Ĉu li verkis sufiĉe?" de Johán Valano (C. Piron); "De tendo al tendo" de Giorgio Silfer (V. Ari); "La perdita hororo de iu Reinhard Haupenthal" kaj "Mia amata Reinhard" de Rikardo Ŝulco (R. Schulz).

A.- Tiuj ĉi vortludoj sufiĉe bone satiras la aktualan esperanto-vivon, interalie pri la perdo de prestiĝo de certa Deklaracio kaj de la Akademio, pri la malsukceso de la Neŭtrala Esperanto-Movado. La aludoj al la aŭtoroj, kiuj estas la plej legataj, estas sprite signifaj.

Cl.- Sed ni daŭrigu nian esploron. En la revuo ENSPEZANTO ne estas TEJO-paĝo, sed TEDO-paĝo. Kaj alia rubriko nomiĝas Kliŝe - Blufe - Fanfarone. Sekvas la Oficiala informilo de la Centra Ofiŝejo de UEA.

A.- Ree aludo al mona problemo en Letero el Japanio:

C1.- Origamio kaj poligamio.

A.- kaj ankaŭ en la subtitolo ENSPEZANTO - Oficiala orkano de Universa Enspezanto-Ambicio.

C1.- kaj sekvas: Fondita en 1905 de M. N. Gamio. Legata de 102 homoj.

A.- Reaktoro: Simio Ĉevapĉiĉi

C1.- La Anonctarifo de ENSPEZANTO estas citinda:

A.- unu paĝo 100 guldenoj, duona paĝo 120 guldenoj, kvinona paĝo 365 guldenoj, unu sepdekkvarona paĝo 900 guldenoj. Eksterrevuaj anoncoj kostas duoble.

C1.- Ankoraŭ pri la mono; jen anonceto:

A.- Savu nin per starigo de la superdemokrata monorganizo!

Cl.- Kaj jen la konsisto de la Estraro de UEA, tio estas de Universa Enspezanto-Ambicio:

A.- Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj akuzativado: Gregoire Maertendenc.

Cl.- Vicprezidanto kaj elstaranto pri paneado, laŭda kaj rigora agado: Rebato Colbasetti.

A.- Vinprezidanto kaj erarano pri koltuko kaj strangulado: Baldaŭ Regosmi

C1.- Neleĝera sekretario: Flarö Sapö-Falsö

A.-

Estinganto pri infiltrado kaj degelita reto: Urseto Brattasilia

Ekstravaganco pri kungrasoj kaj vina agado: Azila Kelo

Ekstribano pri prezidinteco: Havi Doktrin.

C1.- Kelkajn krukaĵojn vi povos ankoraŭ trovi en tiuj paĝoj de ENSPEZANTO, la ŝerctona militkrio de la germana esperantojunularo kontraŭ la tro altaj kotizoj de la TEJO-kongresoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri satiraj paĝoj aperintaj en la revuo GEJ-GAZETO. Ĝis reaŭdo!